

Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto
130
aŭtuno 2022



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

nia federacio sur Facebook

[http://www.facebook.com/
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

prezidanto

Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

aliĝkoto (kun la gazeto)

6 €

ĉeko al:

"Espéranto-Provence"
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Nicole Lafitte
(ĉe la supra adreso de
Pierre Oliva)

sekretario

redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain
48 avenue Alexis Godillot
83400 Hyères
06 42 19 68 51
pascalvilain83@gmail.com

**limdato por sendo de
publikotaĵoj por la venonta n°
25-a de decembro 2022**

bonvolu sendi al la supra retadreso

><><

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

Vorto de la redaktoro

Plurfoje mi jam skribis en nia gazeto pri malfacilaĵoj, kiujn frontas nia federacio, pro la maljuniĝo de ĝia membraro, pro manko de novaj kaj junaj fortoj, pro endormiĝo aŭ malapero de lokaj kluboj... Nun aldoniĝas problemoj pri niaj novembra staĝo kaj gazeto. Pri ambaŭ temoj vi povos legi sur la paĝo 2-a. Spite ĉi tiujn problemojn, kelkaj anoj de nia federacio uzis nian ŝatatan lingvon en internacia etoso, ĉu en Greziljono, ĉu en Montrealo, ĉu en la tuta Eŭropo. Ili verŝajne bone konstatis, ke Esperanto plu viglas, malgraŭ ĉiaj nuntempaj obstakloj. Atestos pri tio artikoloj kaj fotoj sur la sekvaj paĝoj. Agrablan legadon!

Pascal Vilain



enhavo

2	> federacia agado > septembraj forumoj de asocioj	6	> vojaĝemaj Provencanoj
4	> el la provencaj asocioj	8	> agendo
		+	> reta suplemento pri Reunio

Federacia agado

Stage de novembre

Depuis 2019, nous ne nous sommes pas retrouvés à la Maison des Frères pour le traditionnel stage de fin d'année.

Nous espérons pouvoir l'organiser cette année... ce ne sera pas le cas.

La santé de Pierre ne lui permettant pas de prendre en charge tous les repas de samedi et dimanche, nous avons cherché des solutions au Beausset chez les restaurateurs - trop chers - ou chez les traiteurs - plats froids uniquement, pas de possibilité de réchauffer la nourriture sur le lieu du stage.

De plus, les seules chambres à six lits dont nous aurions peut-être pu disposer pourraient même nous être refusées au dernier moment pour cause de réquisition de l'État pour les migrants.

Dans ces conditions, il nous est impossible de retenir cette Maison des Frères.

Nous cherchons un autre lieu, peut-être à une autre date.

Vous en serez informés par message.

Revue Espéranto-Provence

Après des années de bons et loyaux services, le club de Saint-Raphaël, qui avait pris en charge l'impression et l'envoi de notre revue, a souhaité passer la main à une autre équipe.

Nous remercions chaleureusement Denise Loisel, qui s'est occupée de la revue durant... quarante années ! ... ainsi que d'autres membres du club - Monique et Pierrot, Christine, Anita, sans oublier Simone et peut-être d'autres encore - grâce à qui notre publication fédérale a pu être imprimée, pliée, mise sous enveloppe et envoyée.

Sans eux, sans les contributeurs et les différents rédacteurs qui se sont succédé, notre revue n'aurait pu exister.

Il ne vous aura pas échappé que nous subissons actuellement une hausse des coûts de presque tout ce que nous achetons.

Notre revue est touchée par ce problème : hausse des coûts d'impression et d'envoi postal pour la version papier. Nous avons étudié d'autres solutions d'impression, mais nous ne pouvons éviter l'augmentation des tarifs.

C'est pourquoi nous faisons appel à votre générosité. **Tout don, même minime, pour que la revue continue de paraître, serait le bienvenu.**

Si vous souhaitez nous aider, Il vous est possible d'envoyer **un chèque à l'ordre d'Espéranto-Provence (en précisant : pour la revue)**, à envoyer à notre trésorière, Nicole Lafitte, dont vous trouverez les coordonnées en page 1.

Merci pour votre soutien !

Septembraj forumoj de asocioj

**la 3-an en Caromb (84)
la vilaĝo de Bernard Bigonnet**



la 4-an en Avignon (84)



la 3-an en Saint-Raphaël (83)

Mi rehejmiĝis la duan de septembro, reveninte el Hispanio.

Mi celis esti la 3-an en Saint-Raphaël ĉar okazis tiam la asocia forumo, kiu vere gravas. La urbestro vizitis la forumon. Novalvenintoj en Saint-Raphaël estis akceptitaj per aperitivo.

Ludis muzikon nemoviĝanta orkestro kaj du promenantaj ĵazbandoj. Mi akompanis ilin rondirante la "Jardin Bonaparte", lokon kiun mi ŝategas.

Estis multaj budoj inter kiuj nia "Espéranto-Saint-Raphaël". Kiel ĉiam mi emis konigi Esperanton al la plejmulto. Danke al mia brodita vestaĵo, mi allogis multajn homojn. Kelkfoje ili ekkredis, ke nia budo reklamis pri brodado. Mi klarigis pri nia lingvo kaj paroligis danke al mia survesta skribaĵo, estigante dialogeton:

"Bonan tagon! Kiel vi fartas? Bonege!"

Kaj mi adiaŭis per "Ĝis!", donacante kalendareton.



Ĉeestis ankaŭ miaj geamikoj Monik, Kristin, Deniz, Marite, Piero (la tre propagandema), sen forgesi Simon' (nia fidela sekvantino). Ili informis la homojn, kiuj scivolis kaj venis de si mem al la budo.

Ni estis lacaj sed feliĉaj, ĉar ni ĝuis belan tagon en kompanio de afablaj homoj.

raportis Carmen Segarra

la 10-an en La Ciotat (13)

Ĉiam bone organizita de la Domo de Asocioj, la forumo okazis en la urba parko. Tre bone estis, ke ne estas konstanta muziko aŭ parolado ĉe mikrofono, tiel ke eblis respondi aŭ diskuti.



Nia "najbaro" estis instruistino pri la angla, kaj dum la tuta tago sinsekvis homoj por konversacia kurso por plenkreskulo (45 € hore), hora grupa kurso por lernejoj (489 € jare) kaj eĉ por beboj (ekde la dua jaro:

189 € por duonhoro dum lerneja jaro). Kaj ŝi tre feliĉis, ke preterpasanta 4-jarulo mansvingis dirante: "Bye, bye" "Vi bone memoras!" Senkomente!

Evidente malpli da homoj vizitis nin, sed estis tre interesaj interŝanĝoj kun instruistino pri la germana aŭ angloparolanta patro (dum la edzino volis enskribi la infanon al angla kurso).

Feliĉe Loekie venis por helpi min munti kaj malmunti la budon, kaj deĵori posttagmeze. La urbestro kaj ŝia kliko longe haltis kaj diskutis kun kuraĝigaj vortoj "Daŭrigu!", eĉ se la afiŝoj invitis al "Happy days in La Ciotat" (sed ne kulpas la urbo, la afiŝoj venas el Marseille-Métropole...).

Ĉar ne estis ĉijare la famaj kalendaretoj, ni donis flugfolion, aŭ "Espéranto, langue équitable".

Neniu venis al la prezento de la lingvo la postan merkredon, ni vidos ĉu venos novaj lernantoj...

raportis Renée Triolle

la 10-an en Le Beausset (83)

Sabaton la 10-an de septembro okazis la asocia forumo en Le Beausset.

Malgraŭ bela vetero, estis malpli da budoj kaj malpli da vizitantoj ol en la antaŭaj jaroj, krom pri sportaj kluboj. Pro postsekvoj de Kovim-19 sendube.

Komence ni enuis, sopiris...

Nur kvin personoj rapide ekrigardis kaj prenis Esperantajn revuojn disponeblajn senpage.

Malfrue, ne atendite, junulino alparolis nin: ŝi estis tre interesata kaj promesis partopreni niajn kurson kun amikino. Ni esperu!

Finfine kia agrabla forumo, ĉu ne?

raportis Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva

la 10-an kaj 11-an en Embrun (05)

Kunlaborado de esperantistinoj el St-Martin-d'Hères (38) kaj St-Bonnet-en-Champsaur (05)

Bela vetero atendis la partoprenantojn en la Foiro "Génépi" en Embrun.

Marie-Sylvie Julian kaj mi starigis budon de prezentado de dokumentoj kaj tablon sur kiu kuŝis ludoj por ludigi la infanojn. Kiel kutime ne vizitis tiun foiron adoleskantoj kaj junuloj! Tre allogitaj de la ludoj, infanoj ĝojis ludi kaj ofte patrino miris pri tiu nova lingvo! Sufiĉe ofte maljunuloj indikis, ke ili aŭdis pri tiu lingvo antaŭe kaj foje rakontis, ke avo aŭ onklo scipovis paroli ĝin.

Bonega etoso: ni plusemis!

raportis Monique Arnaud



la 11-an en Marseille (13)



El la provencaj asocioj



13 - Espéranto-La Ciotat

Les 24 et 25 septembre s'est tenu à La Ciotat le 1^{er} Salon du livre et des Arts auquel étaient invités 70 auteurs et autant d'artistes (peintres, sculpteurs, relieurs etc.).

Merci à Christiane Ganteaume et à La Ciotadenne qui a ouvert son stand à des invités, dont Espéranto-La Ciotat.

C'est ainsi que j'ai pu exposer mes livres (manuels, dont "Assimil de poche" ou "L'espéranto express", éd. Le Dauphin), ainsi que des livres traduits de l'espéranto : "Flugu kun kakatuo" / "Comme un vol d'oiseaux sacrés", de Trevor Steele, sur l'amitié entre un jeune aborigène et un colonisateur anglais qui va saccager les pâturages et les sources ; en vedette, le

dernier paru : "L'espéranto, langue dangereuse" (L'Harmattan, 2022) sur les persécutions et éliminations des espérantistes sous Hitler et Staline, entre autres dictateurs ; étaient aussi exposés des livres traduits du français en espéranto, dont "Il suffit de passer le pont" de Michel Eliard, essai sur une remise en question de notre société de consommation qui massacre la nature, ou "Tous, super-héros", bande dessinée de Lilian Thuram qui règle les problèmes du communautarisme dans les banlieues par un match de football.

Le jeune Zamenhof, face au même problème dans la Pologne du XIX^{ème} siècle, proposait aux Polonais, Russes, Lituanais, Juifs ou Allemands de se parler

avant de se taper dessus et proposait la langue internationale espéranto.

J'ai eu la surprise de retrouver trois autres espérantistes de La Ciotat : Patrick Chevalier pour son roman "Et si c'était l'autre ?", Mireille Perrier pour ses trois romans et Frédéric Ganga pour ses poèmes !

Samedi après-midi, sur scène lors d'une table ronde, nous avons pu exposer notre travail, évidemment une bonne occasion de parler de l'espéranto ! De même pendant les deux jours.

Les calendriers "Construisons la paix par l'espéranto" étaient arrivés et ont été distribués, notamment aux jeunes. Ce fut aussi l'occasion de rencontrer des sympathisants ("le petit-fils de Zamenhof était mon oncle" ; "je suis né Place Zamenhof à Boulogne" ; "mon père était espérantiste, je suis content que ça continue").



Renée Triolle kaj Patrick Chevalier

Deux jours à avoir la tête comme un tambour à cause de la sono, toujours trop forte, mais de bons contacts.

raportis Renée Triolle



83 - Esperanto-Klubo Fréjus - Saint-Raphaël



Ĉiam estas plezure kunveni ĉe Marica kaj Vinko Bosnjakovic en Les-Arcs-sur-Argens: plaĉa kampara loko, abundaj manĝaĵoj, escepta akcepto de la gastigantoj...

Plian fojon, dudeko da samideanoj tie kuniĝis, laŭdire por pikniko sed fakte por vera festeno!

Ne mankis la diskuttemoj, kaj ni ĉefe aŭdis pri la ĵus okazinta mirinda sperto de Marica kaj Vinko: ilia unua partopreno en Universala Kongreso de UEA, ĉijare en Montrealo. Tio donis al kelkaj la emon partopreni en la venonta UK-2023 en Torino.

Post la manĝo pluis la konversacioj, dum iuj preferis cerbumi - Esperante! - danke al ludoj proponitaj de Christine Graissaguel.

Premio ricevita de Pascal Vilain okaze de la Belartaj Konkursoj en la Montreala UK donis al li la eblon klarigi pri la diversaj verk konkursoj proponitaj en Esperantujo.

La plej konataj, sed ne solaj, sendube estas tiuj **"Belartaj Konkursoj"**, kaj ankaŭ la nove proponitaj konkursoj de **"Bobelarto"**.

Ĉar Pascal ricevis la trian premion en la kategorio "Mikronovelo", li ankaŭ klarigis pri kio estas mikronovelo, kaj kiel malfacile estas verki en ne pli ol 100 vortoj.

Pascal ne partoprenis en la UK de Montrealo, sed Marica kaj Vinko ĉeestis la kunvenon pri anonco de la premiitoj. Kiam estis anoncita la premio de Pascal, Marica surscenejiĝis kaj diris:

"Estas amiko mia, li ne ĉeestas sed mi povos doni al li la premiatestilon."

Tute surprize por Pascal, ŝi do enmanigis al li la dokumenton ricevitan en Montrealo.





**Unua ĉiumonata konversacia rondo
en la kafejo/restoracio
«Carnets de voyage» en Lorgues**

En la malkrokodilejo partoprenis dek homoj: Nicole kaj Gilles Wallez kun lia bofratino (Draguignan), Marica kaj Vinko Bosnjakovic (Les-Arc-sur-Argens), Jean-Claude Roger (Les-Arc-sur-Argens), Paulette Chiarisoli (Correns), Patrick Lagrange (Badon-04), Cathy Cousineau kaj mi (Lorgues).

Okaze de tiu unua renkontiĝo honorige vizitis nin la denaska Esperanto-parolanto kaj astronomo Patrick Lagrange.

Dum unu horo kaj duono ni tiel plezure aŭdadis nur esperantlingvajn interŝanĝojn en la agrabla kvieta korto de la restoracio, tre afable metita je nia dispozo de la gastigantino Jacqueline. Do temis pri ja plaĉa travivaĵo, kiu de nun okazos ĉiumonate...

Ĉiuj malkrokodiloj kaj komencantoj de Lorgues kaj ĉirkaŭaĵoj (kaj ankaŭ malproksimaĵoj...) estas bonvenaj!



La venonta renkontiĝo okazos la ĵaŭdon 27-an de oktobro je la 17-a. (atentu: ebla ŝanĝiĝo de la dato al la vendredo 28-a laŭ alvenebleco de du pliaj samideanoj ne disponeblaj ĵaŭde. Informiĝu prie ĉe Jean-François).

Pliaj informoj:

Jean-François Cousineau > 04 94 47 99 45
(nepre anoncu vin sur la respondilo!)

raportis Jean-François Cousineau



Vojaĝemaj Provencanoj

Naturista festivalo kaj Verda Naturisma Semajno en Greziljono



Eltiraĵoj el artikoletoj verkita de progresantoj dum la verda naturisma semajno, kun la helpo de ilia gvidinto Didier Loison.

Verda Naturisma Semajno

La celo estis lerni Esperanton en naturisma etoso en kastelo Greziljono, de la 4-a ĝis la 8-a de julio 2022. 22 partoprenantoj venis de tuta Francio aŭ eĉ de Kanado. Kelkaj el ili estis komencantoj, en Esperanto kaj en naturismo. Ni estis ĝojaj kaj trankvilaj, junaj kaj maljunaj homoj. Ni interparolis pri ĉiuj temoj, kun multe da libereco.

Thierry (ndlr.: *Thierry Spanjaard, prezidanto de INOE kaj de Marseille-Esperanto*) prezentis la eŭropajn organizojn kaj ties kompleksecon.



Tri membroj de nia federacio partoprenis: Thierry, Rosy kaj Marc, meze de la foto.

La 2-an kaj 3-an de julio 2022 okazis la dua festivalo «**Naturist' por nova mondo**» en la kastelo Greziljono, organizita de la asocio Festinatur. En tiu festivalo, oni renkontis naturistojn, ekologiistojn kaj esperantistojn. Dum la du tagoj oni povis i.a. viziti la budojn de diversaj asocioj, inter kiuj: Esperanto-France, INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista), Vinilkosmo...

107-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo - Kanado de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 2022

Renée Triolle

UK en Montrealo: finfine!

Tri fojojn la LKK devis organizi Universalan Kongreson en Montrealo. Nuligite en aprilo 2020 pro KOVIM, la UK iĝis familia renkontiĝo. Aperis centoj da junaj Usonanoj kaj centoj da junaj Kanadanoj, kiuj ĝenerale ne vizitas la Universalajn Kongresojn, dum "kutimaj" kongresanoj el Orienta Eŭropo ne aliĝis. Kubanoj, Irananoj kaj aliaj simple ne ricevis vizon; mia samĉambranino el Brazilo ricevis sian vizon lunde posttagmeze por kongreso komenciĝinta la antaŭan sabaton. Se Kanado estas tre procedureca lando, la Kanadanoj estas tre afablaj kaj akceptemaj.

Kiel la 107-a UK diferenciĝis de la antaŭaj? Ĉefe rolis la tre bona kongresejo, lokigita en la centro, ĉe piediranta strato kun amaso da restoracioj: moderna universitato (ĉiuj salonoj superekipitaj, kie ni ofte frostis pro klimato), ĉiuj salonoj grupitaj, multaj tabloj kaj seĝoj por amikaj babiladoj aŭ "profesiaj" renkontiĝoj. Tekniko kaj nova skipo de Kongresa Fako (anstataŭ Kongresa Konstanta Sekretario) permesis ne nur ĉeeston sed ankaŭ virtualan partoprenon por la komitatkunsidoj kaj la sciencaj prelegoj de Internacia Kongresa Universitato (libro aĉetebla).



Marica kaj Vinko Bosnjakovic

Estis nia unua kongreso

Jen ni estas en Montrealo.

Ni malkovras urbon kaj nian unuan Esperantan kongreson. Jam en la akceptejo ni perceptas, ke ni ĵus aliĝis al granda familio. Dum unu semajno ni sentas nin kiel hejme. Ni ĝuis ĉiujn prelegojn, koncertojn, kursojn, ekskursojn. Ni admiris ekspoziciojn.

Estis veraj plezuro kaj ĝojo esti kune kaj dank' al nia komuna lingvo Esperanto, ni povis diskuti kun esperantistoj el la tuta mondo.

Ni disiĝis kun malĝojo sed kun promeso resti en kontakto kaj revidi unu la alian la venontan jaron en Torino.

Se la programo iel ŝablonas, ni notu la kurson pri aniŝinabeka lingvo, unu lingvo de la Unuaj Nacioj de Kanado, omaĝe al la kongresa temo "Lingvo, vivo, tero: jardeko de Indiĝenaj Lingvoj" traktita ankaŭ dum diversaj prezentoj, prelegoj kaj interdiskutoj.

Laŭ mi, ĉefe elstaris la kultura programo: duobla ĉiuvespere. Ne vane la Alta Protektanto, Georges Sioui, estas, inter alie, emerita profesoro de la Fakultato pri Artoj de la Universitato de Otavo. La kovrilpaĝo de la kongresa libro anoncis: "Ĝuu la mondon de Bobelarto dum la UK". Efemera artgalerio, verkesejoj estis novaĵoj en la programo de UK. Filmoj en Esperanto, ĉefe indiĝenaj; teatraĵo 1910 pri vojaĝo de Zamenhof al la UK en Usono, kaj multaj koncertoj el la plej diversaj stiloj prezentiĝis en malnovstila kinejo.

Mi mem prelegis pri Victor Lebrun dum la kleriga lundo.

Sed ĉefe, la etoso de la UK bildigis la plezuron esti kune, rekte diskuti dum paŭzoj aŭ promeni. Ĉar ĉu ne estas la ĉefa defio de Esperanto: normala lingvo por homaj kontaktoj?

Provencanoj en Montrealo

*de maldekstre
dekstren:*

Marica
Tony
Vinko
Renée
Thierry



Kiel pli facila estus la vivo se la homoj de la tuta mondo povus kompreni unu la alian, kiel ni esperantistoj, kiuj venas el diversaj anguloj de la mondo!

«Ni esperu, ke tio venos, iam!»

kaj pelmele...



Alain Rémy
revenis el sia vojaĝo tra Eŭropo

Voyage 2022 à vélo couché
21 juin - 14 septembre.
6 107 km

10 pays traversés : France, Belgique, Pays-Bas, Allemagne, Autriche, Slovaquie, Hongrie, Slovénie, Croatie, Italie.



Thierry Spanjaard,
prezidanto de INOE,

partoprenis en la Movada
Foiro de la Montreala-UK.



Monique kaj Laurent (Pierrot)
Prezioso

profitis bankuracadan restadon
en Aŭvernjo por renkonti kelkajn
esperantistojn el tiu regiono.

Sur la foto, de maldekstre
dekstren: Marité (2-a), Pierrot (3-a)
kaj Monique (5-a)



À noter sur votre agenda

dans notre fédération

1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille (13)

Café linguistique espéranto
Brasserie Les Danaïdes
4 square Stalingrad, Marseille 1
infos : *Thierry Spanjaard* - 06 09 18 28 51

dernier mercredi de chaque mois - 18 h - Hyères (83)

Café linguistique espéranto
bar de l'hôtel Ibis-Gare
45 rue Edith Cavell (face à la gare)
infos : *Pascal Vilain* - 06 42 19 68 51

dernier jeudi de chaque mois - 17 h - Lorgues (83)

Café linguistique espéranto
bar-resto « Carnets de Voyage » 12 avenue Allongue
(rue qui descend en face de la mairie)
infos : *Jean-François Cousineau*
04 94 47 99 45 / 06 82 53 52 02 (*laissez un message*)

décembre 17 - Marseille (13)

CIRA - 50 Rue Consolat, 13001 Marseille
Renée Triolle présentera le livre :
"Espéranto - langue dangereuse"
et donnera une conférence

en France


Baugé (49) - Château de Grésillon

riche programme automnal
<http://gresillon.org/?lang=fr>

en Europe

2023 - juillet 29 / août 5 - Turin (Italie)

108^{ème} Congrès universel d'espéranto
infos : <https://www.esperanto.it/torino2023/>



Ĉiuj aliaj virinoj en la oficejo komencis procesojn kontraŭ vi pro seksa persekutado. Ĉar vi ne persekutis min, mia advokato rekomendis, ke mi procesu kontraŭ vi pro diskriminacio.

Vintraj Esperantaj agadoj en Reunio

Dum varme kaj seke someras en Eŭropo, ĉi tie varmete kaj seke vintras !

Mi dezirus raporti pri tri aferoj : la vizito de 6 junaj Esperantistoj dum unu semajno, la kreo de asocio Espéranto Réunion kaj la organizo de kursoj.

Vizito de Esperantistoj

La 30-an de Julio 2022 alvenis al Reunio 6 elstaraj kaj eminentaj junaj esperantistoj : Francesco Maurelli, Sara Spanò, Rakoen Maertens, Saša Murr, Michael Boris Mandirola, kaj Jessy (Wang Fei). Ni pasigis tutan semajnon kun ili. Ili loĝis en nia domo kaj malkovris la insulon dum pluraj tuttagaj ekskursoj, diversaj promenoj, plaĝumadoj, kafejumadoj...



Sur la plaĝo L'Ermitage



En telfero

La renkontiĝo havis ankaŭ seriozajn erojn : informan agadon ĉe la granda bazaro Le Chaudron, prelegojn pri la firmao Kosmo Strategio kaj pri la civitaj volontuloj en Francio.

Informagado sur la bazaro

Ni iris per la telfero al la granda bunta bazaro en Le Chaudron. Ni informis la homojn, disdonis flugfoliojn al la interesatoj kaj kolektis kelkajn adresojn por posta rekonto.

Eramus+ kaj Kosmo Strategio

La Eŭropa Unio, kadre de la sistemo Erasmus+, donas monon por subteni ĉiajn projektojn, kiuj kongruas kun la celoj kaj valoroj de Eŭropo. La firmao Kosmo Strategio, jam de pli ol dek jaroj, muntas tiajn projektojn kaj prezentas al la Eŭropa Unio.

Se vi havas projekton, kiu taŭgas kun Erasmus+, ne hezitu proponi ĝin al Kosmo Strategio : ili verkos vian projekton kaj proponos ĝin al Eŭropa Unio. Eble vi ricevos la monon por efektivigi vian projekton.

La Franca civita volontula servo

Asocio (kaj alispeca organismo) povas akcepti junajn homojn, kiuj pretas labori dum 24 horoj semajne. La Franca Ŝtato pagas stipendion al tiuj homoj. La laboro devas iel utili al la publiko (oni ne rajtas doni al tiuj volontuloj nur internan asocian laboron). Tiuj homoj povas veni de iu ajn lando de la Eŭropa Unio : por junaj esperantistoj, tio estas eksterordinara ebleco labori en Francio por Esperanto, kaj esti pagata dank'al Esperanto ! Tamen la akcepta asocio aŭ organismo ne rajtas postuli la scion de Esperanto : la volontulo, se necese, lernos la lingvon dum sia servo. Aliflanke tio estas ankaŭ okazo por Esperanta asocio disponi pri laborpovo : teni budon, informi, helpi por staĝoj... La Esperanta asocio de Tuluzo uzas tiun eblecon kaj aparte informas pri tiu sistemo.

Kreo de asocio en Reunio



Ni kreis oficialan asocion, nomatan Espéranto Réunion, kiu faros Esperanton pli videbla en Reunio (kaj en Francio). Ni verkis simplajn statutojn, kiujn la prefektejo akceptis, kaj ni malfermis bankokonton. Mi uzas la grupon de Facebook *Esperanto en Reunio* kiel ĉefan komunikilon.

Interese estas, ke jam ekzistis asocio por Esperanto en Reunio, fondita en 1982. Sed ŝajnas, ke tiu asocio malaperis, probable kiam Jean-Pierre Lelièvre, kiu instruis Esperanton en la urbo Le Tampon, emeritiĝis.

Kursoj

Mi organizos du kursojn ĉiun semajnon. Ili okazos hejme. Unu kurso okazos en la mardaj matenoj, por emeritoj aŭ homoj, kiuj ne laboras je tiu tempo. Alia kurso okazos en la merkredaj vesperoj, por la homoj, kiuj devas labori. Mi informis pri tiuj kursoj dismetante flugfoliojn en la letterskatolojn kaj per afiŝoj en la biblioteko, en kulturaj asocioj, sur lokaj Facebook-paĝoj, en diversaj vendejoj, en la sportejo kaj en la urbodomo. Tiuj simplaj agoj estis fruktodonaj ! Mi jam havas plurajn kandidatojn por tiuj kursoj.

Maggy Combout